
La Hodiaŭa Ĵurnalo
2017-11-28 n-ro 369

# Kio igas la homon homo?



Palestinanoj manifestacias kontraŭ la detruado de beduena vilaĝo

WeChat jam pli merkatvaloras ol Fejsbuko

Monda Nutraĵa Programo laŭdas helpon de Ĉinio al rifuĝintoj en Irano

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Palestinanoj manifestacias kontraŭ la detruado de beduena vilaĝo
*La ordo pri malkonstruado de la vilaĝo estis decidita de la Israela armeo p. 03*

Monda Nutraĵa Programo laŭdas helpon de Ĉinio al rifuĝintoj en Irano
*Manĝaĵa sekureco de la plej vundeblaj afganaj kaj irakaj rifuĝintoj p. 04*

*WeChat* jam pli merkatvaloras ol Fejsbuko
*Pli ol 500 miliardoj da usonaj dolaroj p. 04*

Kio igas la homon homo?
*Neŭrobiologoj kredas esti trovintaj la subskribon de la homa inteligenteco p. 05*

Hodiaŭe
*Aleksandro Blok; Carl Jonas Love Almqvist; kaj Stefan Zweig p. 06*

# Palestinanoj manifestacias kontraŭ la detruado de beduena vilaĝo

Ekde vendredo la 24a de novembro, 56 familioj de Beduenoj, kiuj vivas sur la «Monteto de la Papo» en Cisjordanio, estas minacataj pri baldaŭa evakuado. La ordo pri malkonstruado de la vilaĝo estis decidita de la Israela armeo antaŭ kelkaj tagoj. La hebrea Ŝtato konsideras, ke tiuj loĝejoj, konstruitaj sen israelaj permesoj, estas kontraŭleĝaj. Sed la loko aliparte estas situanta laŭ strategia akso inter la Israela kolonio *Maale Adumim* kaj Orienta Jerusalemo. Laŭ la Palestinanoj, la evakuado de *Ĵabal El-Baba* ebligus etendi la kolonion, por rilatigi ĝin al la trifoje sankta urbo. Tiu projekto endanĝerigus la teritorian kontinuecon de Cisjordanio kaj fine, ankaŭ la kreadon de palestina Ŝtato.



Kantante la nacian himnon, manifestaciantoj hisis la palestinan flagon ĉe la pinto de *Ĵabal El-Baba* aŭ «Monteto de la Papo», tiel kromnomita ĉar kelkaj terenoj apartenas al Vatikano. Palestinaj oficialuloj, eŭropaj diplomatoj kaj loĝantoj de la beduena vilaĝo kolektiĝis por kontraŭstari la malkonstruadon deciditan de la Israela armeo. Hasan MAZARA montras per la fingro loĝejon faritan el ferlado kaj lignopecoj: «Ĝi estas mia domo, ĝi estis detruita antaŭ jaro kaj duono».

**La vilaĝo tute minacata je detruado**

Ĉi-foje, la tuta vilaĝo estas minacita je malapero, sed Hasan MAZARA ne timas la buldozojn. «Ĉiuj sciu, ke ni restados, li asertas. Malgraŭ ĉiuj ĉi minacoj, ni restados sur tiu teritorio. Se ili detruas la domojn, ni rekonstruos ilin tuj».

Ĉar, laŭ Fadi KURAN, de *Avaaz*, kiu lanĉis retkampanjon subtene al la beduenoj, tiu evakuado havas precizan celon: «Tiu areo estas strategia. Kion Israelo provas fari, estas evakui la Palestinanojn de tiu tereno, en la celo ĉirkaŭigi Jerusalemon per kolonioj. Ili duontranĉos Cisjordanion, kaj pro tio Palestina ŝtato ne ekzistos».

Neniam Milito Inter Ni

# Monda Nutraĵa Programo laŭdas helpon de Ĉinio al rifuĝintoj en Irano

La Monda Nutraĵa Programo de la Unuiĝintaj Nacioj dimanĉe [26 nov 2017] bonvenigis la kontribuon de Ĉinio, kiu donacis nutraĵon kun la valoro de miliono da usonaj dolaroj al afganaj kaj irakaj rifuĝintoj kaj antaŭenigi klerigadon de rifuĝintaj knabinoj loĝantaj en Irano.

Negar Gerami, reprezentanto de la Monda Nutraĵa Programo en Irano, diris en gazetara konferenco okazigita en Tehrano, ke la Monda Nutraĵa Programo tre dankas la Ĉinan registaron pro ĝia kontribuo, kiu estis efektivigita ekde aŭgusto de la kuranta jaro. Ŝi diris, ke tio ebligos al ili trakti la bazajn nutraĵajn bezonojn de afganaj kaj irakaj rifuĝintoj en Irano, plifortigi iliajn vivmediojn kaj liveri nutraĵan sekurecon.

Laŭ Gerami, la kontribuo de miliono da dolaroj el Ĉinio estis uzita en loka aĉeto de 1 200 tunoj da fortikigita tritika faruno, sunfloroleo, lentoj, rizo kaj sukero kiel manĝaĵoj por 30 mil afganaj kaj irakaj rifuĝintoj loĝantaj en setlejoj en Irano.

Deklaro de la Ĉina ambasadorejo en Irano diris, ke la klopodoj kiel parto de efektivigo de la Helpa Fonduso de la Suda-suda Kunlaboro, kiun iniciatis la Ĉina registaro en 2015, inkluzivas la donacon de miliono da dolaroj por realigo de manĝaĵa sekureco de la plej vundeblaj afganaj kaj irakaj rifuĝintoj en Irano.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# *WeChat* jam pli merkatvaloras ol Fejsbuko

La mona merkatvaloro de la ĉina interreta firmao "*Tencent Holdings*" superis tiun de *"Facebook"*, kiu nuntempe posedas pli ol du miliardojn da aktivaj uzantoj. Unuafoje okazas, ke azia entrepreno merkatvaloras pli ol 500 miliardojn da usonaj dolaroj.




Tiu firmao posedas *"WeChat"*-on, kiu estas programeto por tujmesaĝoj kaj retpagoj, kaj en la lastaj jaroj ĝi iĝis tre populara en Ĉinlando.


La ĉino Ma Huateng, kiu estas la ĉefa afergvida oficisto de *Tencent*, jam estas pli riĉa ol la fondintoj de Guglo, nome Larry Page kaj Sergey Brin, laŭ la magazino *"Forbes"*, kiu informis (marde la 21-an de novembro), ke lia riĉaĵo grandas je 48,3 miliardoj da usonaj dolaroj, igante lin la naŭa pleja riĉulo tutmonde.

Kadre de klasigo de *Forbes* la pozicio de Ma Huateng pliboniĝis post anonco, ke li enkondukos venontjare en Malajzion la pagoservojn de *WeChat*.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Kio igas la homon homo?

Cerboj de ĉimpanzoj kaj de homoj tre similas unu al la alia. Sed en detaloj ekzistas diferencoj kiel tion montras komparoj de la organoj: Neŭrobiologoj kredas esti trovintaj la subskribon de la homa inteligenteco.




La homaro laŭ eldiro de Sigmund Freud el la jaro 1917 devis dum la kuro de sia historio akcepti kelkajn narcisismajn afliktojn.

La unua aflikto estis kaŭzita pri kosmologio, ĉar ekde Koperniko ne plu la tero staras en la centro de la planeda sistemo, sed la suno. La dua aflikto estis kaŭzita de zoologio, ĉar la homo ekde Darwin rangas kiel unu el multaj specioj en la genealogio de la bestoj.

Kaj trie, kiel notis Freud tute sen malĝusta modesteco, ankaŭ lia propra teorio pri la malkonscio kaŭzis tian aflikton al la homaro. Nome estis la ekkompreno ke la "Mio ne estas la ĉefo en la propra domo".

Esploristoj de la *Yale*-universitato komparis homan cerban teksaĵon kun tiu de ĉimpanzoj, makakoj kaj aliaj primatoj kaj malkovris je la nivelo de molekuloj kelkajn diferencojn. Ne por ĉiu trovaĵo ili havis klarigon. Tiel ekzemple ili eltrovis ke en la malgranda cerbo de la homo (kaj nur tie) aktivas la geno ZP2. La geno estas konata el tute alia kunteksto, ĝi reguligas la fekundigon de ovoĉeloj per spermoj. Kiun taskon ĝi havas en la cerbo? La esploristoj konstatis ke ili havas nenian ideon kion ĝi tie faras.

Iom pli evidenta povus esti la kunteksto kun la pensokapablo ĉe jenaj eltrovoj: La esploristoj ankaŭ pristudis la genon TH, kiu estas reguligilo de la mesaĝa substanco dopamino. Tio igas ĝin interesa precipe vide al pli superaj cerbaj funkcioj. En la homa neokortekso ĝi estas tre aktiva - dum ĉe aliaj primatoj ĝi tie malaktivas. Simile statas pri la geno MET kiun oni ĝis nun konis en kunteksto kun aŭtismo.

Ĉiuj tiuj datumoj nun donas klarigan kadron. Kaj tiu kadro montras laŭ la esploristoj kio igas la homan cerbon unika. Ili resumas: "Nia cerbo estas trioble pli granda ol tiu de ĉimpanzoj, ĝi konsistas el pli da ĉeloj kaj sekve havas pli da kalkulkapacitoj. Ekzistas diferencoj ĉe la funkcio de unuopaj cerboĉeloj kaj ĉe la maniero kiel ili interligiĝas."

Ĉu vere ekzistas unikeco en la besta regno? Preskaŭ ŝajnas ke la esploristoj volas nuligi la historian aflikton pecon post peco - kaj permesi al la antikva homcentrismo tra la molekula pordeto reeniron al la scienco.

Ĉiukaze oni povus atesti unikecon, se oni ŝatas trovi ĝin, ankaŭ al aliaj primatoj. Ĉar la diversaj specioj de primatoj havas unikajn ecojn kiuj povas altgrade superi la kapablojn de la homo.

Tamen se temas pri lingvo, kulturo, tekniko, la homo sapiens estas vere aparta specio. Kontesti tion estus ridinde. Ĉu la indiko pri la etaj molekuloj en la granda cerbo klarigas multe en tiu kunteksto, tio estas pridublebla. Almenaŭ eblus revoki al la memoro ke la plej grandan cerbon en la genealogia linio de la homo ne havis la homo sapiens sed la neandertala homo.

Esperanta Retradio



## Aleksandro Blok


**Aleksandr Aleksandroviĉ Blok (ruse Александр Александрович Блок, eventuale esperantigebla kiel Aleksandro Bloko; naskiĝis la 28-an de novembro 1880, mortis la 7-an de aŭgusto 1921) estis elstara rusa poeto, tradukisto kaj artologo, opiniata kiel la plej elstara reprezentanto de la rusa simbolismo.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

---

## Carl Jonas Love Almqvist




**Carl Jonas Love (Ludwig) Almqvist [karl junas luve almkvist] (naskiĝis la 28-an de novembro 1793 en Stokholmo, Svedio, mortis la 26-an de septembro 1866 en Bremeno, Germanio) estis sveda verkisto, romantika poeto, frua feministo, realisto, komponisto, socia kritikisto kaj vojaĝanto.**

**En Esperanto aperis: *Tio konvenas!; Ormuzdo kaj Arimano; La palaco; Nokto de l' poeto*.**

**Vikipedio**

---



## Stefan Zweig

**Stefan Zweig [ŝtEfan cvajk], en Esperanto Stefano Cvajgo (n. la 28-an de novembro 1881 en Vieno, m. la 22-an de februaro 1942 en Rio de Janeiro) estis aŭstra aŭtoro de poezio kaj prozo.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**